D

# SVISA ESPERANTO-SOCIETO
## INFORMAS

N-ro 2/1994 MARTO-APRILO

## ĜENERALA KUNVENO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO 1994

Ĝi okazos la **12an de marto 1994**, 11h00-12h30, en la **Stacidoma Bufedo de la urbo OLTEN.**

### Tagordo

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno (aperinta en SI 3/1993).
b) Raporto de la Centra Komitato de SES (aperos en SI 2/94).
c) Financa raporto.
ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj.
d) Raporto de la komisionoj.
e) Elektoj (de la prezidanto, de du pliaj komitatanoj, de kaskontrolantoj, ktp.)
f) Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro.
g) Proponoj (por esti publikigebla en organo de SES kaj poste diskutebla en la kunveno, propono devas alveni ĉe la sekretario almenaŭ du monatojn antaŭ la koncerna kunveno. Ĝi estu subskribita de almenaŭ tri voĉdonrajtaj membroj).
ĝ) Diversaĵoj.

La estraro ĝojus pri multnombra partopreno.

ooOoo

## KOMUNA TAGMANĜO
### Stacidoma Bufedo, Olten

La stacidoma bufedo rezervas al ni manĝejon, kie povos okazi komuna tagmanĝo ekde la 13h00, sed la antaŭkondiĉo estas, ke ni antaŭmendu la elektitajn menuojn.Tial estas tre grave, ke la tagmanĝontoj bonvolu sin antaŭanonci per pago de SF 25.-al la poŝtĉekkonto de la prezidanto:

Claude GACOND, Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds,
poŝtĉekkonta numero 23-6818-6
Kun la indiko de la elektita menuo: A, B aŭ V.

Jen tiuj menuoj, kiuj kostas po SF 25.-:

**Menuo A:** Spargelcrèmesuppe, Paniertes Schweinsschnitzel, Pommes frites, Kräutertomate, Grüner Salat.

**Menuo B:** Spargelcrèmesuppe, Riz "Pazifique", Pouletgeschnetzeltes an feiner Currysauce mit Früchtegarnitur, Trockenreis, Grüner Salat.

**Menuo V:** Spargelcrèmesuppe, Vegetarisches Nasi-Goreng, Mit Ananas, Sesam und Sojasprossen, Gemischter Salat.

Por mendo surloka la menuoj kostos po SF 30.-. Do indas antaŭaliĝi, kaj tion bonvolu fari kiel eble plej frue. Antaŭdankas via prezidanto, kiu zorgos pri tiu servo.

## LIBRO-SERVO

Siaflanke Andy Künzli okupiĝos pri la libro-servo. Profitu riĉigi vian libraron per akiro de novaj titoloj.

## POSTTAGMEZO

Inter la 14h30 kaj la 16h00 ni organizos ĝeneralan diskuton pri la nuna situacio de la esperanto-movado en Svislando. Ĉiuj vice estos petataj konigi sian vidpunkton, fari proponojn aŭ kritikojn, mencii projektojn, ktp. Inter la diskutaj momentoj aŭdiĝos esperanto-kanzonoj el la novaj sonbendoj kaj kompaktaj diskoj aĉeteblaj.

# RAPORTO DE LA CENTRA KOMITATO
## Claude GACOND, prezidanto

### Dankon al niaj funkciuloj

Dum tri prezidaj periodoj trijaraj mi provis firmigi kaj vigligi nian societon. Nur parte mi sukcesis, kaj mi multe dankas al niaj kunlaborantoj. Tiuj membroj de la Centra Komitato diligente plenumas sian funkcion: regule vi ricevas la organojn **Svisa Esperanto-Societo informas** kaj **Literatura Foiro** dank' al la sindonemo kaj redaktora talento de Fritz Liechti kaj Perla Martinelli. Andy Künzli kaj Ernst Von May akuratas en siaj funkcioj sekretaria kaj kasista. Okazas interesplenaj regionaj semajnfinoj kulturaj en Tiĉino kaj Romandio organizataj de Tazio Carlevaro kaj Nicole Margot, kiujn efike helpas anoj de Tiĉina Esperanto-Ligo kaj Laŭzana Esperanto-Societo.

### Svisa Esperanto-Kongreso

La provo organizi Svisan Esperanto-Kongreson eksperimente realiĝis en Lucerno pro la bonvolo de Angelo Mellini kaj de la membroj de Lucerna Esperanto-Societo, kiuj sin diris pretaj relabori profite al reokazigo de tia kongreso. Ankaŭ la gejunuloj okaze de jarkunveno de JES en La Chaux-de-Fonds pretis renovigi sian kunlaboron. Tiu kongreso ne devus esti rekte ligita al jarkunveno de SES. Tiel ĝi povus okazi en turisme altira periodo akirante internacian karakteron produktivan por niaj rilatoj kun la verda kaj neverda publikoj.

### Al pli kohera kunlaboro

Kun la lokaj kaj fakaj esperanto-societoj la rilatoj estas reale pozitivaj. Fakte pli kaj pli oni sentas la bezonon repensi la kunordigadon de la aktivecoj kaj projektoj cele al pli efikaj rezultoj. Mireille Grosjean proponis, ke KCE kaj SES konsultu fakulon pri varbado kaj Andy Künzli submetis al la membroj de la Centra Komitato analizon pri la nuntempa situacio de esperanto en Svislando. Estus bone, se tiujn proponon kaj analizon ekzamenus ne nur CK-anoj, sed ankaŭ reprezentantoj de ĉiuj esperanto-institucioj svisaj okaze de tuttaga kunveno. Alvenis la tempo kunordigi niajn alirojn al la ekstera publiko seeble per komuna entrepreno. Eble foje vasta publiko simpatios al la programo de **Pro Esperanto**. En Olten, post nia jarkunveno, ni ekdebatos pri tiuj ideoj sen preni tujan decidon.

## Alvenis la momento trovi pli junan prezidanton

En 1994 mi ne plenumis mian prezidan funkcion kun la necesa akurateco. Ekde tri jaroj mia profesia okupo intruista kvazaù voras mian tutan liberan tempon. Rapide asimiliĝi la francan lingvon al neokcidentaj gejunuloj ne estas afero.simpla Sed baldaù alvenos por mi la fino de tiu troa okupiteco profesia. Emeritiĝo ekde la venonta somero redonos al mi la eblon centprocente dediĉi miajn fortojn al esperanto.

Tiam mi ŝatus koncentri min al la fortikigo de CDELI, kiu ricevis pli grandan kaj tre konvenan laborsalonon komence de la pasinta somero. Vi povas imagi, ke la transporto de la tuta materialo en tiun novan ejon ne estis eta afero. Nur fine de januaro 94-a finiĝis la reordigo de la CDELI-kolektoj. Kaj tio grandparte klarigas mian silenton en aliaj poresperantaj taskoj. Ankaù al redaktaj okupoj mi ŝatus min dediĉi ekde julio 94-a: multaj manuskriptoj meritus publikigon kaj mi sentas la bezonon verki pri temoj al mi karaj: Didaktikaj rendevuoj por LF, primovadaj analizoj, esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, interlingvistikaj esploroj, ktp. Tial mi anoncis al la Centra Komitato, ke alvenis la tempo trovi novan SES-prezidanton.

Ni havas la ĝojon anonci, ke Perla Martinelli pretus transpreni la gvidon de nia societo post unu jaro. Jam ĉijare ŝi akceptus la funkcion de vicprezidanto. Tial se neniu pretos tuj anstataùi min, por ankoraù unu jaro mi akceptos gvidi SES-n, se post unu jaro Perla Martinelli povos interŝanĝi la funkciojn kun mi. Pro principo mi opinias, ke kulturan societon ne devas prezidi emerito, sed mi daùre pretos helpi kiel vicprezidanto, same kiel Fritz Liechti faris por mi dum 9 jaroj.

## Ne estas la projektoj, kiuj mankas

Andy Künzli en sia funkcio de sekretario de KCE komencis verki novajn informilojn. SES pretas eldoni ilin. Tial tutcerte baldaù aperos varbiloj, kiuj helpos al la diskonigo de esperanto en Svislando.

Lanĉante la **agadon 2003** ni provis krei apogan sintenon al la eldono de gravaj dokumentoj, interalie de **Leksikono-enciklopedio pri Esperanto kaj planlingvoj aù interlingvistiko en Svislando**. La publikigo de biogramoj en **SES informas** donis taùgan ideon pri la utilo de la entreprenita laboro.

Kuŝas ĉe mi monrezervo de SF 1'500.- por la pretigo de **mini-gramatiko**. Tiun laboron mi devis dormigi ĝis mia emeritiĝo, kaj mi esperas, ke jam en la vintro 94/95-a naskiĝos unua minilibro, kiun ni povos eksperimente uzi por varbaj agadoj espereble surstrataj.

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**

24.3.20.00h Monata kunveno en restoracio Riehentorhalle.S-ro Hans-Peter Senn prelegos pri EGIPTIO.

28.4.20.00h Monata kunveno samloke. Ni volas provi kelkajn ludojn malkovritajn ĉe KCE.

**B E L L I N Z O N A:**

5.3.17.00h kaj 30.4.17.00h, ĉiam sabate en Viale Motta 32.

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37
1.3.19.30h kaj 5.4.19.30h

**ESPERANTO-RONDO BIEL:**

ĉiun vendredon en restoracio AMI,Freiestr8 18.00 - 19.00h

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**

7.3.20.30h en popoldomo, place Chauderon5 prelegos Andres Bickel pri: "LA HOMAJ RAJTOJ" kion ili enhavas kaj kiom ili gravas?

18.4.20.30h Monata kunveno. Temo difinota.

2.5.20.30h S-ro Eichkorn prelegos pri: "LA SOVAĜAJ PLANTOJ"

5.6. Ekskurso. Celo anoncota.

**ANTAŬ-ANONCO:**

10-a kaj 11-a de septembro Semajnfino en la regiono de Lausanne.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**

9.3.14.00-16.00h paroliga kunveno en restoracio Big Ben,Winkelriedstr39 gvido Franz Brügger.

24.3.10.30-20.00h en Simplon, Habsburgerstrasse 16, paroliga leciono de Franz Brügger

20.00-20.20h libera babilado

20.20-20.45h interŝanĝo de informoj, poste s-ro Ernst Glättli parolos pri

MILLAU kaj ĉirkaŭaĵo, kaj lumbildoj pri sudfranca regiono.
Antaŭe konciza prezento de FISAIC:

13.4.14.00-16.ooh paroliga kunveno en Big Ben. Gvido Franz Brügger.

28.4.19.30-20.00h paroliga leciono

20.00-20.20h diskutado de la du jenaj temoj:

1. ĉu LES kontaktu per korespondo eksterlandan Esperantogrupon?
2. ĉu ni povus aranĝi en Luzern semajnfinajn lingvokursojn?

Gvido Franz Brügger.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
Okazos neniu kunveno pro renovigo de la kunvenejo.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**

14.3.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. S-ro Alberto Rodriguez (el Kubo) parolos pri la Esperanto-movado en Kubo.

28.3.19.00h libera kunveno ĉe familio Weidmann, Eisengasse 22. Ni vidos profesian video-filmon de Pola televido, pri la Bahai-centro en Haifa/Israelo.

11.4.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. S-ro Georg Winkler rakontos pri la serĉado de oro en Afriko.

25.4.19.00h Libera kunveno ĉe familio Weidmann.

oo0oo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA/KCE

6-a ĝis 11-a de marto 1994

**Printempa Stud- kaj Feriorestado por komencantoj kaj progresantoj.**

Kun la instruistoj de la KCE-a skipo (KIS)

Ĉi tiu 6-taga lingvokurso ĉefe por komencantoj celas konatigi vin kun Esperanto, ties lingvo, literaturo kaj historio. Oni lernos la lingvon aŭde, lege kaj parole.Matene oni studos, posttagmeze oni libertempos aŭ ekskursos tra la bela ĵurasa regiono,vizitante vidindaĵojn. Kompetentaj instruistoj zorge gvidos vin tra tiu kurssemajno (Lucienne Dovat, Alain Favre, Cosette Cop,Andy Künzli kaj aliaj: Kontribuos Mireille Grosjean kaj Claude Gacond).
Por detalaj informoj turnu vin al KCE.

oo0oo

KORESPONDPETO:

La 19-jara junulo
Vass Tibor
Kun B16
H-3792 Sojobabany
Hungario B-A-Z
ŝatus korespondi kun svisa junulo aŭ junulino, pri iu ajn temo. Koran dankon por ĉiu respondo.

oo0oo

k o r e k t o

En SES INFORMAS 1/1994 sur paĝo 7, 9-a linio de malsupre, devus teksti "JARPROGRAMO" anstataŭ "monata bulteno". Bonvolu pardoni tiun miskomprenon.
-FL-

oo0oo

## ESPERANTOKURSO EN ĜENEVO

1. por komencantoj 20.00-20.55h
2. Ekzercado de la fluanta parolado kaj plivastigo de la vorttrezoro 19.00-19.55h

Datoj:

| | |
|---|---|
| 8.3. mardo | 28.4. ĵaŭdo |
| 14.3. lundo | 4.5. merkredo |
| 17.3. ĵaŭdo | 13.5. vendredo |
| 13.4. merkredo | 17.5. mardo |
| 22.4. vendredo | 26.5. ĵaŭdo |

Gvidanto de la kurso estas sinjoro Andres Bickel, 6 rue Thomas Masaryk, 1202 ĝenevo, ĉe kiu oni ankaŭ ricevas detalajn informojn.

oo0oo

## MALFERMAJ PORDOJ EN KCE KAJ CDELI

**Sabate** la 16-an de aprilo, 09.00-17.00h, KCE/GEP estas viziteblaj dumtage por la "ekstera" publiko. Oni prezentos interalie la libroservon de KCE kaj lingvokurseton por komencantoj kun enkonduko en la lingvon Esperanto. Informu viajn konatulojn kaj amikojn pri la malfermitaj pordoj kaj venigu ilin al KCE.

oo0oo

## AL LA SKIANTOJ EN SVISLANDO!

Ĉu vi intencas interŝanĝi viajn skiojn aŭ/kaj viajn ski-vestojn?

S-ro Somogyi Andras, Rozsa u 2/b, H-6768 Baks Hungario skribis ĝentilan leteron. Li estas instruisto en la vilaĝo Baks. Li kaj lia klaso tre volonte skias, sed ili devas ĉiam lui la ŝuojn kaj la ski-vestojn. Tial li demandas,se iu ĉe ni aĉetos novajn skiojn aŭ eĉ intencas ŝanĝi sian ski-ekipaĵon, ĉu li/ŝi konsentus disponigi la malnovajn aĵojn al ni,ĉu kontraŭ modesta prezo, ĉu senpage? Ĉe ni monata salajro estas 300-400 DM. Tial ni ne povas aĉeti novajn ekipaĵojn.

Red/FL: Mi apelacias al ĉiuj skiantoj ne forĵeti supre menciitajnobjektojn. El la supraj linioj vi vidas, ke estas homoj, kiuj danke akceptus ilin.

oo0oo

**EN LA DUA DUONO DE LA JARO 1993 SES RICEVIS LA JENAJN DONACOJN, POR KIUJ LA ESTRARO TUTKORE DANKAS:**

H. Sandmeier 10.-, R.van Puijenbroek 10.-, H. Siebers 30.-, T. Gamper 20.-,P.Dorthe 20.- D. Bertolini 100.-, J.-P. Brunod 10.-, CH. Scheidegger 50.-, F. Mottu 50.- Entute 250.-

**POR "AGADO 2003" ESTIS EN LA DUONA DUONO DE 1993 LA JENAJ KONTRIBUOJ:**

J.-J. Lavanchy 50.-, P. Scherer 50.-,H.Ringli 10.-, A. Baur 20.-, L. Dovat 20.-, F. Gabbrielli 50.- Entute 200.-

Sinceran dankon ankaŭ por tiuj-ĉi valoraj kontribuoj.

oo0oo

SVISA ESPERANTO-SOCIETO: B I L A N C O 1 9 9 3

| Jarkalkulo | Buĝeto 93 | Enspezoj | Buĝeto 94 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj (inkl. 2 dumvivaj) | 7'500.- | 7'175.- | 8'000.- |
| Abonoj sen membreco | 500.- | 420.- | 500.- |
| Donacoj | 1'200.- | 730.- | 800.- |
| Agado 2003, donacoj | 1'000.- | 1'010.- | 1'000.- |
| Interezoj SKA k. GEP malnetaj | 2'500.- | 2'488.20 | 2'300.- |
| Enspez-sumo | 12'700.- | 11'823.20 | 12'600.- |

| | | Elspezoj | |
|---|---|---|---|
| Literatura Foiro LF | 5'000.- | 4'767.- | 5'000.- |
| SES Informas SI | 2'200.- | 2'018.40 | 2'200.- |
| UEA kotizoj k. fakturoj | 150.- | 64.50 | 150.- |
| Propagando, Varbado | 5'000.- | 725.- | 4'000.- |
| Administraj kostoj | 2'500.- | 890.65 | 1'500.- |
| Kunvenoj ĝeneralaj k. regionaj | 1'000.- | 450.- | 800.- |
| Libroj aĉetoj | 0.- | 74.40 | 100.- |
| Argus | 1'200.- | 1'226.70 | 1'300.- |
| Subvencio al JES | 1'000.- | 1'000.- | 1'000.- |
| Agado 2003 kostoj | 1'000.- | 90.- | 1'000.- |
| Bankspezoj k. Diversaĵoj | 300.- | 202.80 | 300.- |
| Elspez-sumo | 19'350.- | 11'509.45 | 17'350.- |
| GAJNO+/PERDO- | - 6'650.- | + 313.75 | - 4'750.- |

| Kapitalo (SKA kaj GEP) | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|

| | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| Gastejo Edm. Privat GEP, konto 079 | | 40'311.30 | |
| Inventaro | | 1.- | |
| SKA konto kuranta | | 20'003.75 | |
| SKA konto Agado 2003 | | 876.40 | |
| SKA k. GEP antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 870.90 | |
| Kapitalo je 01.01.93: | 61'740.10 | | |
| Plus nuligo de pas. junul. vojaĝfond. | + 9.50 | | |
| Plus GAJNO kiel supre | + 313.75 | | |
| Kapitalo je 31.12.93: | 62'063.35 | | 62'063.35 |
| | | 62'063.35 | 62'063.35 |

Reserva kapitalo (SVB)

| | | Aktivoj | Pasivoj |
|---|---|---|---|
| SVB ŝparkonto | | 11'764.- | |
| SVB antic. impostoj, bonhavo ĉe ESV | | 163.- | |
| Reserva kapitalo je 01.01.93: | 11'461.35 | | |
| Plus interezoj malnetaj | + 465.65 | | |
| Reserva kapitalo je 31.12.93: | 11'927.- | | 11'927.- |
| | | 11'927.- | 11'927.- |

| | | |
|---|---|---|
| Posedaĵkomparo: Posedaĵo 31.12.1992 | 73'201.45 | Oberuzwil, 93-12-31 |
| Posedaĵo 31.12.1993 | 73'990.35 | la kasisto: E. von MAY |
| Kresko | 788.90 | E. v. May |

**BIBLIOTHÈQUE DE LA VILLE DE LA CHAUX-DE-FONDS**
CENTRE DE DOCUMENTATION ET D'ÉTUDE SUR LA LANGUE INTERNATIONALE
CENTRE CULTUREL ESPÉRANTISTE

merkrede - vendrede 13-15.4.1994

## KURSO PRI INTERLINGVISTIKO

CDELI (Centre de documentation et d'étude sur la Langue internationale), kunlabore kun Kultura Centro Esperantista, intencas aktiviĝi ankaŭ en kursa kaj kunvena agado, kun celo popularigi interlingvistikon, kaj prezenti la plej novajn atingojn en tiu scienco. Tiucele, CDELI organizas kurson por interlingvemuloj, al kiu eblos parto- preni ankaŭ nur unusolan tagon.

### PROGRAMO

Mekrede 14.04.94
14.00–17:30: Prelegos Claude Gacond pri *Panoramo de Interlingvistika disvolviĝo laŭ la tempo: tendencoj kaj movadoj, kaj reciprokaj influoj*. Kun lumbildoj, kaj ekspozicieto.
La vespero (20:00-21:30) estos dediĉata al dokument-analizo.

Ĵaŭde 15.04.94
La mateno (9:00-11:30): dokumentanalizo.
14:00-17:30: Prelegos Claude Gacond. *Pri enprofundiĝo en kelkaj antaŭesperantaj lingvoprojektoj:* Universalglot, Volapük (traduko, verba sistemo), Idiom Neutral.
La vespero (20:00-21:30) estos dediĉata al dokument-analizo.

Vendrede 16.04.1994
La mateno (9:00-11:30): dokumentanalizo. Kun T. Carlevaro kaj/aŭ Tomasz Chmielik.
14:00-17:30: Prelegos Tazio Carlevaro, pri *kompara tradukado de nacia lingvo al Interlingua*, respektive al Esperanto.
La vespero (20:00-21:30) estos dediĉata al dokumentanalizo.

### ATENTU

*Loko:* Biblioteko (CDELI-ĉambro).
*Loĝado:* principe ĉe KCE (se dezirate, oni indikos ankaŭ lokajn hotelojn).
*Manĝoj:* liberaj.
*Eblas* (a) ne partopreni la dokument-analizon; (b) Partopreni unu solan tagon.
*Oficiala lingvo:* Esperanto (aliaj lingvoj laŭnecese allasataj).

**LASTA ALIĜDATO: 10.04.1994**

**ALIĜKOTIZOJ:**

| | |
|---|---|
| plenkreskuloj: | CHF 30.- tage; |
| se 3 tagoj: | CHF 75.- |
| studentoj kaj 3-aĝuloj: | kalkulu 10%-an rabaton |

**KOTIZOJN KAJ ALIĜILON SENDU AL:**

Pagu al la indikita poŝtĉekkonto la aliĝkotizon kaj la ĉambro-antaŭpagon:

*CDELI, c/o Dr. Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, CH-6500 Bellinzona,*

*pĉk: la Chaux-de-Fonds, 23-6008-0*

× × × × × × × × × × × × × × × × × Tranĉu kaj sendu × × × × × × × × × × × × × × × ×

**ALIĜILO**

sendota al la adreso indikita supre

| | |
|---|---|
| Nom / *Familia nomo* | |
| Prénom / *Persona nomo* | |
| Age / *Aĝo* | |
| Adresse / *Adreso* | |
| Téléphone | |
| Catégorie / *Kategorio* (soulignez / *Substreku*) | adulte / *plenkreska*, étudiant / *studento*, 3e âge / *triaĝulo*. |
| Participation / *partopreno* | 1 jour / *tago*, 2 jours / *tagoj*, 3 jours / *tagoj* |
| Autres requêtes / *Aliaj petoj* | |
| Arrivée / *Alveno* | |
| Départ / *Foriro* | |
| Date de l'inscription / *Aliĝdato* | |
| Signature / *Subskribo* | |

**BIBLIOTHÈQUE DE LA VILLE DE LA CHAUX-DE-FONDS**
CENTRE DE DOCUMENTATION ET D'ÉTUDE SUR LA LANGUE INTERNATIONALE
CENTRE CULTUREL ESPÉRANTISTE

sabate - dimanĉe 16-17.4.1994

## COLLOQUE D'INTERLINGUISTIQUE - KOLOKVO PRI INTERLINGVISTIKO

Semajnfine okazos publika kolokvo, kun la celo prezenti la laboron de pluraj esplorantoj pri planlingvistiko, kiuj dum lastaj jaroj evidentigis interesan laboron en interlingvistika esplorkampo. La celo estas diskuti kune pri aktualaj temoj. Oficialaj lingvoj: franca, germana, itala, kaj ĉiuj planitaj lingvoj.

**Samedi - Sabate 14-14:30:**
Enkonduko (Direktoro de la Biblioteko, T. Carlevaro, C. Gacond)
Unua Sesio sub la prezido de C. Gacond
14:30-15:00: Dr Lilli Papaloïzos: /Ethnologie/
15:00-15:30: Dr Vera Frank-Barandovska: Naturalismo en interlingvistiko
15:30-16:00: Dr Furio Gabbrielli: "Adelante, Pedro, con juicio"
16:00-16:30: Paŭzo
16:30-17:00: Claude Gacond: Traduko kaj enhavo de "Yelabuk Pedipedelas"
17:00-17:30: Perla Martinelli: Transnacia redaktado: kultura revuo en planlingvo
17:30-18:00: Reinhard Haupenthal: Aktuala situacio de volapükaj esploroj: atingoj kaj bezonoj
18:00-18:30: Tomasz Chmielik: Edmond Privat: kiel, kiam.

**Dimanĉe 09-13:45:**
Dua Sesio sub la prezido de T. Carlevaro
09:00-09:30: Dr Giorgio Silfer: Hispanoidoj inter skemismo kaj naturalismo
09:30-10:00: Dietrich Weidmann: Kiom da Esperantistoj ekzistas tutmonde?
10:00-10:30: Paŭzo
10:30-11:00: Andy E. Künzli: temo difinota
11:00-11:30: Alain Favre: Langues planifiées et sciences biologiques: l'exemple de la mycologie
11:30-12:00: /difinota/

**SAMEDI SOIR - SABATA VESPERO**

Vespera rakledo ĉe KCE, Postiers 27, 2300 La Chaux-de-Fonds. Kosto: CHF 20.- . Neŝatantoj rajtos ricevi ion alian, sed devos aparte peti tion. Pour le samedi soir nous organisons une raclette au Centre culturel espérantiste, Rue des Postiers 27, au prix de CHF 20.- par personne. Ceux qui n'aiment pas la raclette sont priés de nous en informer.

**LIEU - LOKO**

En Salono Humbert, aŭ en Salono CDELI/ Salon Humbert, soit Salon du CDELI, Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, 2300 La Chaux-de-Fonds.

## SERVICE DES LIVRES - LIBROSERVO

Surloke eblas aĉeti libro-brokantaĵojn, tra la brokantejo de CDELI, dum la paŭzoj, kaj dum la atendotempo. Krome, eblos aĉeti ankaŭ la modernajn librojn de la KCE-libroservo. Il sera possible d'acheter des livres nouveaux et des livres d'antiquariat sur les langues planifiées.

## CHAMBRES - LOĜADO

Eblas loĝi ĉe KCE ~~(kie ĉiu rajtos mem peti, kaj mem pagi)~~. Eblas ankaŭ mendi ĉambron en urba hotelo, aŭ en la junulargastejo. Priatentu la aldonitan informfolion. Il est possible de trouver un logement au Centre culturel espérantiste à des prix abordables. Il est aussi possible de trouver des chambres d'hôtel, ou des places à l'auberge de jeunesse. Lisez la feuille ci-jointe.

## LANGUES OFFICIELLES - OFICIALAJ LINGVOJ

Oficialaj lingvoj estos la franca, la germana, la itala, Esperanto, kaj aliaj planlingvoj. Les langues officielles seront le français, l'allemand, l'italien, l'espéranto, autres langues planifiées. Sans traduction.

## FRAIS D'INSCRIPTION - ALIĜ-KOTIZO

Kontribuo: CHF 30 por la dutaga partopreno. CHF 25 por studentoj, 3-aĝuloj, kaj por partoprenintoj al ĉiuj 3 pli fruaj leciontagoj. Nous vous demandons une contribution pour participer à cette rencontre. Elle consiste de CHF 30.- si vous serez présent pendant les deux journées, CHF 25 si vous êtes encore étudiant, ou bien si vous avez participé aux journées d'étude précédantes.

## DERNIER TERME D'INSCRIPTION - LASTA ALIĜDATO: 10.04.1994

## INSCRIPTION À - KOTIZO KAJ ALIĜILO AL:

Pagu al la indikita poŝtĉekkonto la aliĝkotizon / Tous les paiements doivent être adressés à:

***CDELI, c/o Dr. Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, CH-6500 Bellinzona,***
***pĉk: La Chaux-de-Fonds, 23-6008-0***

✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ Découpez et envoyez / *tranĉu kaj sendu* ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂ ✂

**MODULO D'ADESIONE / *ALIĜILO*** (à envoyer à l'adresse indiquée plus haut; *sendota al la adreso indikita supre*)

| | |
|---|---|
| Nom / *Familia nomo* | |
| Prénom / *Persona nomo* | |
| Age / *Aĝo* | |
| Adresse / *Adreso* | |
| Téléphone | |
| Catégorie / *Kategorio* (soulignez / *Substreku*) | adulte / *plenkreska*; étudiant / *studento*; 3e âge / *triaĝulo* Participant du 13-15 / *Partoprenis al 13-15* |
| Autres requêtes / *Aliaj petoj* | |
| Arrivée / *Alveno* | |
| Départ / *Foriro* | |
| Date de l'inscription / *Aliĝdato* | |
| Signature / *Subskribo* | |

**BIBLIOTHÈQUE DE LA VILLE DE LA CHAUX-DE-FONDS**
CENTRE DE DOCUMENTATION ET D'ÉTUDE SUR LA LANGUE INTERNATIONALE
CENTRE CULTUREL ESPÉRANTISTE

# INFORMATIONS - INFORMOJ

## LIEU DU COLLOQUE - LOKO (KONGRESEJO):

Bibliothèque de la Ville, Salle du CDELI / Salon Humbert, Progrès 33, 2300 La Chaux-de-Fonds. La sidejo estos malfermita jam merkrede 15.4.1994, je 12:00, por akcepti la alvenantojn. Le salon sera ouvert à partir du 15.4.1994, à 12:00, pour accueillir ceux qui arriveront.

## SECRÉTAIRE ORGANISATIF - ORGANIZA SEKRETARIO:

Dr Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona; pĉk / ccp 23-6008-0 (CDELI, 2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando). Telefono / téléphone (*vespere; le soir*): ++41 (0) 92 / 25 29 88; Fakso /Télécopieur: ++41 (0) 92 / 25 95 59.

## SERVICE DES LIVRES - LIBROSERVO

CDELI kaj Kultura Centro Esperantista organizos standon kun libroj en kaj pri esperanto, kaj kun interesaj bibliotekaj brokantaĵoj, je aĉetodispono de la interesatoj, dum la labor-paŭzoj, kaj antaŭ - kaj post - la prelegaro. Le CDELI et le Centre culturel espérantiste organiseront un service des livres avec des livres nouveaux et des livres d'antiquariat.

## À VOTRE ARRIVÉE - JE VIA ALVENO:

JE VIA ALVENO tuj anonciĝu ĉe la giĉelo en la kongresejo mem (en la Biblioteko). Tie vi trovos telefonon por eventuale telefoni al la hotelo rezervita. A votre arrivée, annoncez-vous tout de suite à la Bibliothèque. Vous y trouverez un téléphone, qui peut servir à confirmer votre arrivée à l'hôtel où vous avez réservé une chambre.

## POUR RÉSERVER DES CHAMBRES - POR ĈAMBRO-REZERVOJ:

Ni aldonas ĉi-ene prezaron de hoteloj en La Chaux-de-Fonds, de la Junulargastejo, kaj de Kultura Centro Esperantista. Bonvolu rekte rezervi tie! Tamen, nia sekretariejo estas je dispono en specialaj cirkonstancoj. Ci-joint vous trouvez l'adresse et l'indication des prix des hôtels de La Chaux-de-Fonds, de l'Auberge de jeunesse, et du Centre culturel espérantiste. Veuillez y faire vous-mêmes vos réservations, éventuellement à travers la Fédération neuchâteloise du tourisme. Notre secrétaire reste à votre disposition pour des cas spéciaux.

## ATTENTION - ATENTU

La Chaux-de-Fonds situas je 1000 m/sm, t.e. en aprilo povus facile frosti kaj neĝi. La Chaux-de-Fonds se trouve à 1000 m/sm. Ceci signifie qu'en avril il peut neiger! Souvenez-vous-en!

*CDELI, c/o Dr. Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, CH-6500 Bellinzona,*
*pĉk: La Chaux-de-Fonds, 23-6008-0*

# LISTE DES HÔTELS - HOTELLISTO

## *Informoj kaj rezervado / Informations et réservations:*

**Fédération neuchâteloise du tourisme**
**Rue du Trésor 9, CH-2001 Neuchâtel**
**Tf. ++041 (0)38 25 17 89**
**Fax ++041 (0)38 24 49 40**

*Hôtels de La Chaux-de-Fonds: Prezoj 1994 / Prix courants 1994:*

Hôtel Moreau, Av. Léopold-Robert 45, Téléphone 039 23 22 22 (CHF 75/175; double 180/255)
Hôtel Club, Rue du Parc 71, Téléphone 039 23 53 00 (CHF 135/150; double 190/210)
Hôtel du Moulin, Rue de la Serre 130, Téléphone 039 26 42 26 (CHF 60/65; double 90/100)
Hôtel de la Balance, Rue de la Balance 8, Téléphone 039 28 26 21 (CHF 35/65; double 70/100)
Hôtel de France, D-Jean Richard 46, Téléphone 039 23 11 16 (CHF 41/86; double 62/132)
Hôtel de la Croix d'or, Balance 15, Téléphone 039 38 43 53 (CHF 30/37; double 60/74)

Auberge de jeunesse, Rue du Doubs 34; 2300 La Chaux-de-Fonds (++41 /0/39 28 43 15): CHF 21,30.

**Centre culturel espérantiste**
**c.p. 779, Rue Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds**
**Tf ++41 (0)39 26 74 07**
**Fax ++041 (0)39 26 62 03**

*Kostoj ĉe KCE / Prix du CCE:*

CHF 15.- par nuit dans une chambre à 4 lits (unu nokto en 4-persona ĉambro); CHF 25.- par nuit, dans une chambre à 2 lits (unu nokto en 2-persona ĉambro); CHF 40.- dans une chambre à un lit (unu nokto en 1-persona ĉambro). Mais les lits sont en nombre limité (La litoj estas en limigita kvanto).

## P E N T E K O S T O  1 9 9 4

**Antwerpeno, urbo de Eŭropa Kulturo invitas vin**

20-a ĝis 23-a de majo 1994 Pentekosto.

Ni estas deko da bonaj, sindediĉaj, spertaj esperantistoj. Ni ofertas ion, kio estas malofta en Esperantio. Ni proponas altnivelan programon. Ni preparis nin por akcepti kaj dorloti vin je pentekosto 1994. Ni akiris spertojn en 1993, kiam Antwerpen estis Kultura ĉefurbo de Eŭropo. En tiu jaro ni akceptis 150-on da esperantistoj el 10 landoj. La organizado estis sufiĉe glata kaj ni ricevis ege favorajn reagojn de la partoprenintoj. La etoso estis internacia,amika, intima kaj niaj gvidantoj estis fluparolantaj kaj bone preparitaj. Tial ni laboros laŭ la sama skemo kiel pasintjare. Ni ne enfermas vin en kongresejon, sed faros nian eblon por konigi al vi la artajn, folklorajn kaj turismajn riĉaĵojn de nia urbo. -FEL-

Detala informo estas ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Bonvolu aldoni al vi afrankitan koverton. Dankon. -FL-

oo0oo

**46-a IFEF ESPERANTO-KONGRESO 1994**

La internacia kongreso de la internacia federacio de esperantistaj Fervojistoj (IFEF) okazos de la 13-a ĝis la 20-a de majo 1994 en **KREMS**/Aŭstrio.

Detalojn volonte donos Gertrud Eggenberger, Wurmbühlstrasse 10, CH-8405 Winterthur.

oo0oo

## ĜOJIGA EĤO EL TORUN/POLLANDO

De Walter Kobelt en Arbon ni ricevis la informilon de la Svisa Esperanto-Societo. Tralegante "SES INFORMAS 6/93" ni trovis vian biogramon kaj la noton, ke vi fariĝis 80-jara. Je tiu evento ni tre kore kaj samideane gratulas kaj bondeziras vin, kara estimata jubileanto. Ni deziras al vi pluan bonegan, valoran aktivadon, en bona saneco, por nia Esperanto-movado.

-La Esperanto-Societo "FLAMO"/Torun-

oo0oo

## KORESPOND-DEZIRO

La Esperanto-Societo "FLAMO", poŝtfako 16, PL-87-100 Torun 1 multe ĝojus korespondadon kun svisaj gesamideanoj. Koran antaŭdankon por ĉiu respondo.

oo0oo

## TUTMONDA KONGRESO DE LA MONDFEDERALISTOJ

Tiu kongreso okazos en Glarus de la 27-a ĝis la 31-a de julio 1994. Ĝi kunigos homojn el la tuta mondo en Svislando. Ĉar tiu movado konsistas el homoj konsciaj pri homara familio demokrata, ni devus varbadi ĉe ili pri Esperanto.

Kiu povus alporti varbilojn al Glarus kaj eventuale deĵori dum tiu kongreso kelkajn horojn tage?

Se vi pretus transpreni tiun taskon, anoncu vin al nia prezidanto Claude Gacond kaj samtempe al KCE en La Chaux-de-Fonds, ĉar tie kuŝas la varbiloj. -MG-

oo0oo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
Red. Telefon 01/381 77 13

## LONGJARA MEMBRO FORLASIS NIN POR ĈIAM

La 3-an de februaro 1994 mortis, 85-jara,

DORA HEMMANN EL BERN

Dum multaj jaroj ŝi estis membro de la Esperanto-Societo Bern, de SES kaj de KELI. Ĉiuj, kiuj konis ŝin, estimis ŝian sinceran kaj pacaman karakteron.

Kara Dora, vi restos ĉe ni en bona rememoro.

-Red.FL-

oo0oo

La limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 3/1994 estas la 5-a de aprilo 1994.

ooo0oo